

180

STIFTO

El la enhavo:  
Nova vortaro ĉ-e  
Majo de Mácha  
Kiel al Montpelier  
Konkursoj  
Seminarioj  
Aboneblaj gazetoj


berger DEMO : Pu...ase

ww



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

**Ĵus aperis la plej ampleksa  
Ĉeĥa-esperanta vortaro  
512 paĝoj, 23 565 esprimoj**



**La aŭtoro de la vortaro Karel Kraft  
ĉe sia komputilo, en kiu formiĝis  
la ĵus aperigita vortaro.**

*Foto: P. Chrdle*

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-foje jare. Abono 16 gld.

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio,  
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por  
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato.

**Membrokotoj:** A 160 Kč, B 80 Kč, (C  
nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G  
100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20  
ECU, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 335 Kč komencantoj,  
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntová,  
Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova  
658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** infana, junulara, skolta,  
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-  
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-  
amikara, de esperantaj-kolektantoj

**Komisioj de ĈEA:** gazetara-informa,  
ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**Internet:** cea@tnet.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100,  
Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,  
747 05 Opava, tel: 0653/611 823

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso  
02.9912126

**Vicprezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603  
00 Brno, tel. 05/4323 3047

**Sekretario:** Květa Krajičková-Hubnová,  
Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

**Komitatano:** Blanka Gruntová, Vítězná 95,  
784 01 Červenka-Litovel

**Komitatano:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,  
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332  
278, fakso 0631/332 507

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží  
45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Jana Holcová,

Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:  
Josef Hron, Libuše Krejčí)

**Kontisto:** Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147  
00 Praha, tel: (02) 4446 0162

**Ĉefdelegito de UEA:** Stanislava Chrdlová,  
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel.  
02.9912201, fakso 02.9912126

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724  
0690

## Variabilní symboly pro platby ČES

311 expedice, úhrada koupených knih

604.2 písemné kurzy

604.3 předplatné Starto

604.5 předplatné Internacia Fervojisto

668 dary svazu

694 členské příspěvky ČES

694.1 členské příspěvky UEA

789.1 sekce mládeže

789.10 sekce šachistů

789.11 sekce sběratelů

789.13 Sciencia revuo

789.15 ediční fond, Ringo

789.16 subkonta klubů mimo uvedených

789.17 Sekce nevidomých

789.19 Propagace v reg. tisku

789.3 sekce železničářů

789.7 sekce pedagogů

789.71 ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně  
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do  
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.  
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!  
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte  
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK  
PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC  
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol.  
Dojde-li platba s označením „ČESKÝ  
ESPERANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme,  
kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako  
dary svazu.

ISSN 1212-009X

## Novjara preparo

Antaŭ kelkaj semajnoj ni trairis jarŝanĝon, kiu nin alproksimigis je plua paŝo al la tria miljaro. Sed antaŭ ol ni eniros ĝin, estas nia devo lastajn jarojn de la dudeka centjaro plenumi per celkonscia kaj persista laboro. Ni rerigardu, kia estis el tiu ĉi vidpunkto la jaro ĵus finiĝinta.

Kompare kun sia antaŭulo ĝi povus ŝajni iom griza, sen gravaj rezultoj kaj sen elataraj eventoj. Sed ja ĝuste tiuj normalaj kaj trankvilaj jaroj estas ponto, kiu formas ligilon inter jaroj kun sukcesoj fascinaj kaj mondoskalaj. Abunda rikolto ĉiam bezonas tempon, en kiu oni ŝvelmoligas grundon kaj semas grajnon.

La pasintan jaron oni povas taksi kiel jaron preperan. Ni iom ripozetis post la penega naŭdeksesa kaj ni preparis fundon, sur kiu oni povas strarigi novajn agadtendencojn. La Kampanjo 2000 fruntas ilin. Ĝuste ĝi kaj eblecoj de ĝia plenumo sur la landa tereno estis unu el la ĉefaj temoj diskutitaj en la konferenco okazinta en Praha. Oni parolis pri vico de lokaj kaj regionaj renkontiĝoj en pluraj lokoj de nia respubliko, pri preparoj de kelkaj gravaj publikaĵoj, el kiuj du ĝuste eniras la esperentistan merkaton, pri preparo de faka seminario pri aplikado de Esperanto, pri reaktiviĝo de asociaj sekcioj, kiuj iom paŭzetis en aktiva agado.

Kompreneble, la plenumata laboro neniel elstarigas la pasintan kaj ankaŭ fluantan jarojn, sed tiuj estas necesa bazo por antaŭenigi nian movadon en senco de proklamitaj celoj de la Kampanjo 2000 en nuntempaj ne facilaj enlandaj kondiĉoj organizaj, financaj kaj membropersonaj. Mi forte kredas, ke sur tiu bazo niaj fidelaj kaj oferemaj membroj elkulturos sukcesajn kaj rimarkindajn movadajn produktojn.

Vlast. Kočvara

Ancoraŭ rememoro al nia jarkonferenco en decembro 1997: Eva Seemannová kaj ŝia atentema publiko dum deklamo de versoj el la plumo de Eli Urbanová



Jus aperis, post 12 jaroj de diligenta laboro de ĝia aŭtoro Mgr. Karel Kraft kaj liaj fidelaj kunlaborantoj, la plej ampleksa ĉeĥa-esperanta vortaro, kiu enhavas sur 512 paĝoj 23 565 esprimojn. La grandiozan laboron partoprenis jenaj kunlaborantoj de la aŭtoro: Marie Bartovská, Sláva David, MUDr. Josef Hradil, Mgr. Zdeněk Hršel, RNDr. Josef Kavka, CSc., Miroslav Malovec, (†) Jaroslav Mařík, Jaroslav Mráz, Ing. Zdeněk Pluhař, Lubomír Středa, JUDr. Karel Traxler kaj Doc. Ing. Jan Werner.

Komune kun la Esperanta-ĉeĥa vortaro de la aŭtoro duopo Karel Kraft kaj Miroslav Malovec ĝi alportas ĝis nun mankantan vortprovizon, kiu povas tre bone servi ne nur dum simpla korespondado, sed sufiĉas eĉ por verkado kaj tradukado de pli komplikaj beletraĵoj kaj fakaj verkoj. Ni kredu, ke la dispono de tia ampleksa vortaro ankaŭ levos la lingvonivelon de niaj esperantistoj.

Ambaŭ vortaroj aperis en la eldonejo KAVA-PECH Dobřichovice. Sed ili jam estas mendeblaj ankaŭ en la libroservo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj baldaŭ ili estos rekte aĉeteblaj en ĉiuj bonaj librovendejoj en Ĉeĥio (same kiel la lernolibro de geedzoj Chrdle *Esperantem za tři měsíce*). Tio havas ankaŭ alian trajton ol doni al esperantistoj eblon provizi sin aĉetante. Estas ja videble en normalaj profesiaj librovendejoj, ke Esperanto vivas kaj ekzistas kaj ke ĝi havas ĉiujn bazajn instrumentojn por ellerni kaj praktiki ĝin (lernolibron kaj

ambaŭ flankoj de sufiĉe ampleksa vortaro).

Kiel eldonisto mi volas publike danki al la aŭtoro Karel Kraft pro lia neimag-ebla pacienco kaj laboremo, kun kiu li laboris ĉe la komputilo, korespondadis kun siaj kunlaborantoj, rapidigis ilian laboron, kongruigis iliajn ofte malajn opiniojn kaj finfine sukcesis gvidi la laboron en la presretan formon. Sed mi volas ankaŭ danki al liaj kunlaborantoj, kiuj estis foje ankaŭ forte rezistemaj oponantoj - kaj laste, tamen ne malgrave al la angla slavisto

bone reganta la ĉeĥan lingvon, perfekta esperantisto kaj mia bona amiko Richard Howard, kiu en la lasta fazo de la laboro venis kun pluraj trafaj rimarkoj kaj gardis, ke en la vortaron ne penetru ĉeĥismoj, kio ja estas ofta kazo de la vortaroj, ne nur rilate Esperanton.

La vortaro kostas 188 Kč.

Petro Chrdle

## Nova ĉeĥa-esperanta vortaro



## Informoj el la asocia komitato

La lasta komitatkunsido, pri kiu mi informis sur la paĝoj de Starto, okazis fine de aŭgusto. Post ĝi la komitato kunvenis nur en novembro por dediĉi diskutojn al la konferenco, kiu efektiviĝis komence de decembro en Praha. Aliaj programeroj de la komitatkunsido aŭ ne estis tiom gravaj aŭ ili estis forŝovitaj por la januara kunveno.

Tiu okazis en Brno la 17-an de januaro. Unue oni parolis laŭde kaj ankaŭ kritike pri la konferenco kaj ĝia programo. Estis laŭde taksita la fakto, ke ĝi en ofertitaj de la domposedanto kondiĉoj fluis kontentige, malgraŭ ke unu el la ĉeforganizantoj, komitatanino K. Hubnová-Krajíčková neatendite ekmalŝanĝis kaj la tuta surloka laboro falis je V. Podhradská. Al ŝi kaj ankaŭ al ŝiaj memvolaj helpistinoj la komitato esprimis sian dankon kaj ĉe tiu okazo ankaŭ mi refoje dankas kun profunda rekono al ĉiuj, kiuj helpis.

La komitato pensis jam pri ĉijara konferenco de la asocio kaj decidis okazigi ĝin en norda Bohemio. Tiucele estas serĉata konvena loko kaj organizokapbla klubo. Dua grava temo - kiel kutime - rilatis al mastrumado de ĈEA. Estis konstatite, ke diversaj plendoj de membroj ofte fontas el maldisciplineco de klubo aŭ de individuoj mem. Ekzemple la kotizojn de membroj oni ne transdonas al la asocio, kiel postulas la kotizregularo. Kompreneble, koncernaj kotizintaj membroj poste ne ricevas Starton kaj

ne rajtas uzi aliajn asociajn rabatojn. Alia afero estas foja iniciatemo de membroj, kiuj sen ia ajn konsultiĝo kun la asocio aŭ klubo realigas eĉ multekostajn ideojn kaj poste postulas de la asocio koncernan repagon. Mi atentigas niajn membrojn, ke ne eblas kalkuli kun financa partopreno de la asocio en afero pli frue de la komitato ne aprobita. Kvankam nia financa stato iom pliboniĝis rezulte de la Praga UKo, ni devas konstante tre strikte gardi kaj elspezi niajn rimedojn kaj prudente plani ĉiujn antaŭvidatajn pagojn.

Plua grava programero de la kunsido estis Kampanjo 2000. La komitatanoj diskutis diversajn manierojn de ĝia apliko en niaj agadkondiĉoj. Post diskuto oni taskis al la prezidanto ellabori kompletan planon kaj surtabligi ĝin el la komitato por aprobo.

En plua parto de la komitata traktado, dediĉita al diversaj, la komitatanoj memkritike parolis pri plenumado de sia respondeco en destinitaj fakoj, poste estis ellaborita la kalendaro de la komitatkunsidoj. La komitato dediĉis atenton ankaŭ al stato de Esperanto-fako de la muzeo en Ĉ. Třebová kaj parolis pri nivelo de Starto kaj akceptis kelkajn proponojn.

La venonta kunsido okazas fine de februaro en loĝloko de nia vicprezidanto - en Dobřichovice.

VI. Kočvara

# Sangokoloro

En nunjara februaro ni memorigas al ni tre malbonfaman datrevenon. Ĝi estas jubilea kvindeka datreveno de venka februara komunista puĉo, kiu ĵetis nin por 41 jaroj sub knuton de komunismo kaj estis al ni dum tutaj tiuj jaroj prezentita kiel kontraŭsocialisma puĉo, venkobatita de venka laborista klaso. Do post netutaj tri jaroj de fino de sesjara germana okupacio venis nova teroro, ĉi-foje de niaj propraj homoj. Por plena kulmino post 20 jaroj venis 23-jara rusa okupacio, preteksto de kies instalado estis fikcia ĉeĥoslovakia kontraŭ-revolucio.

Pri ĉi tiu tiel nomata kontraŭ-revolucio estis multaj anekdotoj. Ni memorigu al ni unu el ili: Ivan, kiu partoprenis en aŭgusta atako al Ĉeĥoslovakio, revenis post soldatservo hejmen. Konatuloj demandis lin: „Nu, Ivanĉjo, ĉu vi vidis kontraŭ-revolucion?” „Jes, mi vidis ĝin.” „Kaj kie estas via najbaro Vasĉjo?” „Vasĉjo estas en Siberio. Li ne vidis ĝin.”

Sed ni revenu nuntempen. Ni transvivis ambaŭ okupaciojn kaj samlandanan teroron. Malaperis ruĝa stelo kaj anstataŭis ĝin ĉerizoj - simbolo, kiu estas pruvo de absoluta politika impotenteco de nuntempaj komunistoj. Kiam ili atingis tion, ke direktodona rolo de komunista partio estis deklarita en konstitucio, ili devis plu zorgi pri nenio kaj ilia nekapableco iĝis totala. Ĉerizoj havas nenion komunan kun la sango, per kiu estis koloritaj kaj proletara flago, kaj

ruĝa stelo. Komunistoj ne sekretis, ke tio estas koloro de la sango, sed ili gloris ĝin kiel sian propran sangon, kvankam ĉiu scias, ke ili verŝis multe pli da sango de siaj kontraŭuloj ol de sia propra. Cetere eĉ la propra verŝita sango montras, ke substanco de komunista ideologio estas sangverŝa perforto. Plene pri tio atestas procesoj, precipe en unua jardeko de komunista superregado: Homoj, kiuj pro iaj ajn kialoj iĝis politike neakcepteblaj, estis juĝitaj surbaze de konstruiciitaj kaj tute mensogaj akuzoj, devigitaj kulpokonfesi kaj ekzekutitaj, en pli bonaj kazoj malliberigitaj en punlabo-

rejoj, kie multaj mortis. Inter kondamnitaj estis eĉ multe da komunistoj (ekzemple ankaŭ Gustav Husák estis 10 jarojn malliberigita).

Mia avino diradis: „Se almozulo sukcesis surĉevaliĝi, eĉ diablo ne kuratingos lin.” Verecon de ĉi tiu sentenco plene pruvis komunistoj: Iamaj mizeraj proletoj post ekkapto de potenco iĝis senlimigitaj suverenoj kaj diktatoroj, kiuj senkompatate pereigis ĉion, kio baris la vojon al ili. Sed fine montriĝis, ke ĉi tiu vojo celas nek Romon, nek brilegajn morgaŭojn, sed ĝi forvaniĝas kaj malaperas. Estas ironio de la sorto, ke materiistoj Marx, Lenin kaj ĉiuj ceteraj pliperfektigantoj kaj interpretistoj de marksismo-leninismo estis efektive idealistoj, kiam ili kredis, ke ĉi tiu teorio helpos enkonduki pli bonan socian



ordon, ol estas kapitalismo. H. G. Wells tion bone trafis, kiam li skribis, ke Lenin estas revulo de Kreml.

Ni scias, ke komunista stelo estas kolorita per sango, ke ĝiaj kvin pintoj signifas kvin kontinentojn, sed malmultaj scias, kiel ĝi fakte estiĝis. Nikolaj Vasiljevič Krilenko, maristo, kiu per la kanonpafado el krozoŝipo Aŭroro donis ordonon por komenco de Oktobra Revolucio, estis poste membro de Revolucia Milita Konsilantaro, kies prezidanto estis Trockij. Krilenko estis membro de peterburga esperantista rondeto kaj havis sur la jako Esperantan insignon - verdan kvinpintan stelon. Trockij la insignon rimarkis kaj demandis Krilenkon pri ĝia signifo. Krilenko klarigis al li, ke verda koloro estas koloro de espero kaj kvin pintoj signifas kvin kontinentojn. Al Trockij la insigno ekplaĉis, krom ĝia koloro, kaj li decidis, ke insigno de sovetiaj soldatoj estos ruĝa kvinpinta stelo.

Tiel Esperanta verda stelo de espero naskis komunistan ruĝan stelon de teroro, kiu poste insidis kontraŭ sia „patrino“, ĉar Esperanto, kiu fratigas homojn, estis ĉiam salo en okuloj por ĉiuj perfortemaj reĝimoj. Hitler en sia libro „Mein Kampf“ skribis, ke Esperanton elpensis judoj, por ke ili ekregu la mondon (d-ro Zamenhof estis judo). Sed fine la ruĝa stelo mortis pro kadukiĝo kaj ĝia „patrino“ transvivis ĝin. Do mi volas fermi per duverso, per kiu finiĝas unu kanto:

Donu Dio, ke stelo per sango kolorita por ĉiam enkotigŭ.

*Lubomír Středa*

## GAZETOJ ABONEBLAJ



Peranto por Ĉeĥio: Vladislav HASALA, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 STRÁŽNICE, distr. Hodonín tel./reg.: +420/631/332 507, 332 278, tel/fakso: 0631/332 507,

gazeto	jarkotizo
RIVEROJ	Kĉ 305,-
SENNACIULO	Kĉ 500,-
TUTMONDAJ SCIENCO KAJ TEKNIKO	Kĉ 461,-
INTERLIGILO	Kĉ 80,-
JUNA AMIKO	Kĉ 125,-
LA KANCERKLINIKO	Kĉ 429,-
KOSMOS	Kĉ 204,-
LA MIGRANTO	Kĉ 60,-
LA ONDO DE ESPERANTO	Kĉ 525,-
LITERATURA FOIRO	Kĉ 507,-
LITOVA STELO	Kĉ 341,-
MONATO	Kĉ 505,-
MONDA SOLIDARECO	Kĉ 55,-
OOMOTO	surfacoŝte: Kĉ 200,- aerpoŝte: Kĉ 250,-
ESPERANTISTO SLOVAKA	libervola mondonaco almenaŭ unufoje jare
EVENTOJ	Kĉ 616,-
INFORNILO de AEH	Kĉ 70,-
LA MERKATO	Kĉ 376,-
LA VERDA LUPEO	Kĉ 392,-
O S I EK	Kĉ 115,-
AFRIKA VEKIĜO	Kĉ 108,-
AMIKEKA RETO	Kĉ 60,-
	+ Kĉ 20,- por sendokostoj
EL POPOLA ĈINIO	Kĉ 525,-



# Scivole tra Esperantujo

En Javier Alonso

28, Rue Clemenceau, FR-44470  
CARQUEFOU, Francio - preferas  
virinojn ĝis 40-jaraj

Kiu volas ŝakludi en la ĉeĥa teamo en  
la venonta, jam la IX-a teamturniro de  
EŜLI, bonvolu skribi al la adreso de:

Jaromír Canibal

Okružní 867

734 01 Karviná-Ráj

tel./fakso: 069 6317838

tel. al mia laboro: 069 63111431

e-majlo: canib@ova.comp.cz

## Al Internacia Pedagogia Revuo aliĝis:

1. Gustav Heczko	200,-
2. Josef Mendl	100,-
3. Jarmila Rýznarová	100,-
4. Jiří Patera	100,-
5. Jana Melichárková	100,-
6. Josef Vojáček	100,-
ekzamenoj de AEH	454,-

## Donacoj de la membroj

M. Suchová	125,-
Ant. Bombionka	200,-
M. Bartovská	900,-
A. Milatová	800,-
Dr. Hradil	100,-
R. Snopek	1.000,-
K. Hromek	40,-
V. Rychlík	20,-
R. Michna	20,-
J. Rybenský	120,-
J. Rumler	120,-
B. Grim	100,-

J. Blažek	20,-
Z. Militký	20,-
P. a V. Dvořákovi	2.000,-
A. Klementová	100,-
B. Zubová	100,-
L. Skřehota	20,-
C. Vrbík	120,-
-----	
sume	5.925,-

**Pasintjare atingis 60 jarojn amata  
prezidanto de nia rondeto Alois Jakubec.**  
De jaro 1998 li estas emerito. Tuta  
rondeto kredas, ke pro tio li havos pli  
multe da tempo ne nur por multaj  
amantinoj, sed ankaŭ por nia E-grupo.  
Nome de E-rondeto en Hranice

Ivan Potiška.

## Kolekto 2000

**EUROKKA** (Esperanto-Rok-Asocio)  
okaze de sia 10-jariĝo kunlabore kun  
Kampanjo 2000 projektas serion de 6/8  
kompaktaj diskoj de diversaj E-artistoj.  
La unua aperonta en majo 1998 estos de  
**JoMo**, sekvos kantoj de **Jacques Yvart**,  
kontaktitaj estis **La Kompanoj** el  
Bordozo kaj rokbando **Persono** el  
Svedio. Hodiaŭ **EUROKKA** serĉas  
sponsorojn, monsubtenantojn,  
mecenatojn, partnerojn kaj abonantojn:  
**EUROKKA, FR-31450 Donneville,**  
Francio.

**Biblioteko de Brno ricevis subtenon**  
Aŭtune 1997 UEA lanĉis informon pri  
Biblioteka Apogo Roma kaj Poul  
Thorsen por subteni E-bibliotekojn per  
libroj el Libroservo de UEA. Ĝis la

limdato UEA ricevis 21 subvencipetojn. Por 1997 la Apogo ricevis 3500 gld., kiujn jurio disdonis inter 6 bibliotekoj: Hispana Esperanto-Muzeo, hungara Esperanto-Kolektaĵo Fajsz, Esperanto-Klubo en Brno, Irana Esperanto-Junularo, Kolektiva Esperanta Biblioteko en Jekaterinburg, Krasnojarska Esperantista Klubo, srilanka Esperanto-Centro de Ja-Ela, ĉina Donghu-a Esperanto-Domo kaj Triesta Esperanto-Asocio. Aliaj havas ŝancon ĉijare.

**Karlovaraj esperantistoj** regule kunvenadas nun en unu el ĉambroj de **DISTRIKTA BIBLIOTEKO** en Karlovy Vary, Lidická 40, ĉiun unuan jaŭdon de monata (se ĝi ne estas ŝtata festo - tiam la kunveno okazas jaŭde en la dua semajno (ekde la 17-a horo).

Anna Klementová


**Sabate, la 29 11 1997**  
**ESPERANTISTA KLUBO PRAHA**  
**95-jara**

Tiun ĉi gravan eventon en nialanda E. Movado memoras ankaŭ la ĉeĥa poŝto, nome la poŝtoficejo en sudmoravia urbeto Strážnice, distr. Hodonín per porokaza E.lingva afrankmaŝinstampilo (vidu la apudan bildon), kiun oni tie uzadas dum tagoj 25 11 - 31 12 1997. Aŭtoris ĝin jam tradicie konata duopo el Prago: laŭ projekto de ing. ark. Karel KUCA ĝin majstre gravuris s-ro Karel PAVLÍČEK. La kluban fondkunvenon inter aliaj partoprenis ankaŭ fama ĉeĥa poeto S. K. Neumann. Pluajn informojn Vi povas ricevi je adreso: ESPERANTO, poŝtkesto 36, 696 62 Strážnice

Jaŭde, la 5-an de februaro 1998 okazis en propra klubejo de E-klubo Prostějov jarkunveno, dum kiu estis denove elektita la sama estraro. La aranĝon kun regalo partoprenis pluraj gastoj el ĉirkaŭaĵo de E-klubo (Olomouc, Přerov), kun kiuj estis interkonsentita plua kunlaboro.

## JUBILEOJ

Jubileoj komence de 1998



Oldřich Toman, Děčín	(85)
Zdena Matyková, Hr.Králové	(85)
Božena Killerová, Frýdek-Místek	(80)
Josef Bouda, Blatná	(80)
Anna Leichmannová, Střelice	(75)
Jiří Laube, Roudnice	(75)
Květa Strýhalová, Hr.Králové	(75)
Rostislav Podepřel, V.Bitýška	(75)
Marie Bašková, Lysá n.L.	(75)
Vlasta Chalabalová, Plzeň	(75)
Miroslav Milanovský, Kamýk	(70)
Bláhomil Koželuh, Střibro	(70)
Ing. Lumír Holajín, Ostrava	(70)
Antonín Bretšnajdr, Skalice	(70)
PhDr. Marie Kyselová, Ostrava	(70)
Karel Karpecki, Jablunkov	(60)
Ladislav Kellner, Ostrava	(50)
Jarmila Malasková, Bohuňovice	(50)
Jaroslav Beneš, Třebíč	(50)
Stanislav Čech, Dubňany	(50)
Miroslav Vaculík, Liptál	(50)

## MEMORE AL IVO LAPENNA

(05.11.1909 - 15.12.1987)

La kreinto de la moderna  
Esperanto-Movado

Frue Ivo Lapenna estis internacie orientita. Kiel 17-jara gimnaziano li sciigis pri la Internacia Lingvo. Li tuj komprenis ĝian geniecon kaj komencis mem studi ĝin. En 1929 li iniciatis kaj kunfondis la „Studentan E-Klubon“ en Zagreb. Ekde 1937 ĝis 1950 li estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj estrarano de UEA ekde 1947, ankaŭ redaktoro de la fama, jugoslavia organo „La Suda Stelo“, revuo socia, kultura, literatura kaj primovada. Ekskluzive pro politikaj kaŭzoj Ivo Lapenna forlasis Jugoslavion en 1949. Li venis al Parizo kaj fariĝis kunlaboranto de „Centre National de la Recherche Scientifique de Droit International Public“. En 1951 li translokiĝis al Londono, kie li ricevis postenon en la mondfama universitato „The London School of Economics and Political Science“, Universitato de Londono. Tie li fariĝis profesoro pri Kompara Sovetia kaj Orienteŭropa Juro, per kio li atingis sian duan proferecon. Kiel estrarano kaj ekde 1955 ĝenerala sekretario de UEA Ivo Lapenna iniciatis kaj gvidis multnombrajn agadojn. Ekz. en 1949: Internacia Somera Universitato (nun Internacia Kongresa Universitato); Belartaj Konkursoj kaj Oratora Konkurso (siatempe premiita per la arĝenta „Pokalo Ivo Lapenna“); 1952: Fondis „Centro de Esploro kaj Dokumentado“ (CED); 1952-1954: Grandaj kampanjoj (miloj da artikoloj kaj impona

ekspozicio) lige kun la Peticio al UN / UNESKO, kronitaj per la konsultaj rilatoj inter UEA kaj la tiama partipolitike neŭtrala UNESKO kaj per la Rezolucio de UNESKO de la 10-a de decembro 1954. Tiu plej grava Rezolucio estas la bazo de ĉiuj sekvantaj atingoj de la Esperanto-Movado, i.a. la impona Zamenhof-Jaro 1959, kun amaso da artikoloj en nacilingvaj periodaĵoj, ekspozicioj, prelegoj, informoj en radio kaj televido kaj festoj okaze de plia rondvojaĝo de Ivo Lapenna en kelkaj landoj kun kulmina, altnivela festo en Kopenhago. Zamenhof estis deklarita kiel unu el la grandaj personecoj de la homaro fare de UNESKO; 1961: Aĉeto de la domo de UEA en Rotterdam per rimedoj havigitaj ĉefe dank' al jura argumentado kaj negocado de Ivo Lapenna. Oni bone komprenas la fakton, ke Ivo Lapenna ricevis la epiteton „La konstruinto de la moderna Esperanto-Movado“. Ivo Lapenna iniciatis kaj gvidis la sukcesan kampanjon pri la Peticio 1966 por progresigi Esperanton en internaciaj medioj pere de la Propono al UN okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro - la plej impresa iam ajn prezentita de privata instanco (UEA). Preskaŭ unu miliono da individuoj kaj iom malpli ol 4.000 organizaĵoj subskribis la Peticion. En 1974 li forlasis UEA, ĉar ĝi ĉesis estis neŭtrala.

El liaj verkoj pleje gravas *Retoriko, Esperanto en Perspektivo, Aktualaj problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo, La Internacia Lingvo, Elektitaj Paroladoj*, kiuj estas ĉefa fonto pri historio de nia movado.

laŭ Birthe Lapenna

## NI KONDOLENCAS



**Josef Vaněček** (1923-1998), honora prezidanto de AEH, forpasis post grava malsano la 8-an de januaro 1998, unu tagon post sia 75-a naskiĝtago.

Li naskiĝis en Devín apud Bratislava, gimnazion studis en Brno. Post la mondmilito li soldatservis kaj daŭrigis studojn en armea lernejo. Kiel oficiro li atingis la rangon de kolonelo. En 1950 li edziĝis, sed en 1967 lia edzino mortis postlasante infanojn Josef, Jan kaj Eva.

En 1961 Josef Vaněček suferis gravan vundon de kruro post motorcikla akcidento, submetiĝis al dek operacioj, sed pro nekonvena kuracado li tute surdiĝis dum dek tagoj.

Esperanton li eklernis per koresponda kurso ĉe MUDr. Hradil kaj komprenis ĝian kuraĝigan forton por handicapitoj. Dum resaniga restado en Hrabyně (1985) li fondis kune kun dudek interesatoj Esperanto-grupon, kiu poste fariĝis bazo de sekcio de invalidoj kadre de CEA. Dum pluaj kvin jaroj la sekcio atingis 800 anojn.

En 1992 la sekcio memstariĝis kiel Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj,

agnoskata ankaŭ de UEA. S-ano Vaněček kiel ĝia prezidanto organizis plurajn AEH-kongresojn, kun sia kunulino kaj lastjare edzino Jarmila Rýznarová preparadis 8-paĝan AEH-informilon; li iniciatis instalon de memortabulo al Zamenhof (1991) en la banurbo Františkovy Lázně, surloke de iama E-monumento (1914), detruita de faŝistoj, kaj reinstalon de la tabulo en 1994, post kiam la unua estis neniiĝita de vandala adoleskanto.

Pasintjare oni amputis al li piedon kaj konstatis kanceron. La aŭtuna AEH-kongreso en Skokovy, kiun li jam ne povis partopreni, atribuis al li titolon Honora Prezidanto de AEH.

En nia memoro restos lia majesta figuro kun blankaj haroj kaj barbo, kiu alparoladis nin dum niaj kongresoj kaj konferencoj per laŭta kaj urĝa voĉo de neaŭdanta homo, sed de entuzisma batalanto por la internacia lingvo.

**Rikardo Ŝulco** (1906-1997)

propranome Richard Schulz, forpasis la 26-an de oktobro 1997 en Minden (Germanio). Kiel korifeo de Analiza Skolo li vekis en lastaj jardekoj diskutojn pri gramatikaj problemoj, proponante eĉ kontraŭfundamentajn solvojn, tamen li riĉigis nian literaturon per originalaj verkoj (*La trombonoj de Jeriko*, *Vespero jam fariĝis*, *La mago*), per pluraj tradukoj (el Böll, Morgenstern, Czerny, Bürger kaj mezepokan *Til Strigospegul*) kaj per lingvistikaj studoj (*Pledo por unueca lingvo*, *Sur la vojo de Analiza Skolo* k.a.)

## FABELOJ POR KOMENCANTOJ

### Pri Grumbluleto

En arbaro vivis gardisto de multjara pino, kiun ĉiuj koboldoj, feinoj kaj bestetoj, kiuj loĝis en la arbaro, nomis Grumbluleto. Jen tial, ĉar li senĉese nubmienis. Neniu el la loĝantoj de la arbaro sciis, kial Grumbluleto ankaŭ ne iomete ekridas.

Foje ili interkonsilis, kiel igi Grumbluleton iomete ekridi. Unu el la koboldoj elpensis ideon. Li diris:

„Sciu, ni ĉizos en la ŝelo de la pino, kie li loĝas, same tian nubmienan koboldon, kia li estas; kiam li vidos, ke tio nepre ne estas bela, li certe deklutimigĝos.“

Kiel ili diris, tiel ili faris. En la ŝelo de la pino, kiun prizorgas Grumbluleto, la koboldoj ĉizis lian nubmienan reliefon. Kaj ĉu vi kredas, ke tio helpis? Tute ne. Kiam Grumbluleto vidis tion, li nubmienis ankoraŭ pli multe, ja ŝajnis, kvazaŭ li kolerus kontraŭ ĉiuj.

Sed tamen Grumbluleto ellernis ridi. Ĉu vi sopiras scii, kiel tio okazis? Iam dum tagmezo, kiam la suno plej multe varmbrilis, ekpomenis Grumbluleto. Li forlasis sian dometon en la pino celante en la arbaron. Li iris nubmiene, eĉ teruro eliris el li, infanoj. Sed subite li haltis. Li aŭdis doloran lamentadon de ia besteto. Grumbluleto, eĉ se li tiom grumblis, estis bonfaranta, kiel estas ĉiuj koboldoj. Li rapide postsekvis la voĉon.

Li venis sur arbohakejon kaj vidis sur ĝi sciuron. Etan lamentantan sciuron. Ĉasisto pafcelis ĝin, sed ĝi ne volis, ke li kaptu ĝin, do atendis, ĝis kiam la ĉasisto foriris. Poste ĝi volis transsalti sur alian arbon, sed piedeto pafvundita de ĉasisto tiom doloris ĝin, ke ĝi falis surteren.

Grumbluleto la sciuron atenteme prenis kaj transportis ĝin en sian pinan domon, kie li bandaĝis la piedeton de la sciuro, metis ĝin en liteton kaj foriris al feinoj por alporti kuracilon.

La feinoj donis al Grumbluleto en kaliketo de glano delikatan unĝventon kaj la koboldo rapidis kun ĝi hejmen. Poste li surŝmiris la vundon kaj bandaĝis denove la piedeton. Ĝi rapide resaniĝis, tiel ke jam post malmultaj tagoj la sciuro saltadis sur arboj kiel antaŭtempe.

Vi povas facile pripensi, kiel ĝojegis Grumbluleto pro la resanigo de la sciuro. Eble unuafoje li ne nubmienis. Sed tio ne estis eĉ plu ebla. La sciureto ne forgesis plu Grumbluleton. Ĉiutage ĝi venis viziti la dometon kaj rakontis al Grumbluleto, kion ĝi faris dum la tuta tago. Pri la petolado de la sciuro Grumbluleto eĉ senvole ekridis.

Foje venis la sciuro neatendite frumatene. Grumbluleto klarigis al la sciuro iel honte, ke nenio lin trafis, ke li malofte ridas. Sed la sciuro diris nekontente: „Ho, se vi tiel nubmienos, oĉjo, mi ne plu vizitados vin. Mi ŝatas



ridon kaj ĝojon. Se vi nubmienas, tio ne plaĉas al mi."

Grumbuleto ekridis kaj promesis al la sciuro, ke li neniam plu nubmienos. Kaj li plenumis sian promeson.

Kie ne sukcesis ceteraj koboldoj kaj bestetoj, tie sukcesis eta gaja sciuro. Grumbuleto nun emas ridi kaj lia laboro en la arbaro nun estas pli sukcesa. Sed kiel ni nun titolos lin, ĉu vi scias, infanoj?

### Vanta Nikso

Meze en arbaro situis bela lageto, kiu estis bordata en du flankoj de verda kanaro. Sur unu bordo estis arbaro, de alia flanko estis parte sabloza plaĝo, post kiu ree situis arbaro. La loko estis tiom bela, ke tien venis en somero infanoj por bani sin. Ja tie eĉ tiom plaĉis al ili, ke foje en somero aro da knaboj elkonstruis tendaron.

Sed ne kredu, ke la knaboj, kiuj tie somere vivis dum kelkaj semajnoj, estis nuraj loĝantoj de la arbaro kaj de la lago. En la arbaro estis amasoj da koboldoj kaj feinoj. En la lago loĝis de unu flanko nikso kaj en ties mezo havis plurajn ĉambretojn najadoj. Ni rakontas ion pri la nikso. Li loĝis ĉe la lageto kaj lia tasko estis manĝigi fiŝojn, kiuj en ĝi vivis, kaj lia grava zorgo ankaŭ estis pri akvopureco. Nia nikso plenumis siajn taskojn vere bone. La fiŝoj prosperis. En la lageto ili estis tre multaj kaj la akvo estis pura kvazaŭ kristalo.

Sed la nikso eksopiris pri la monda parado. Li ĉesis ŝati sian jaketon ŝpinitan el akvaj vaporoj kaj sopiris havi tian jakon, kian knaboj portas. Vane la najadoj

malkonsilis la nikson, li ne volis obei. Li ĉiam restadis ĉe la knaboj.

Dum iu tago li vidis unu knabon inter ili, kiu riparis sian jaketon. Li kudris ion sur ĝi. La ceteraj knaboj vokis la kamaradon ial, tiu metis la jakon kun la kudrilo sur sidilon kaj forkuris ien. Tiun momenton eluzis la nikso kaj forportis la jakon. Sed kiel li estis seniluziigita certigante, ke la jako estis tro longa. Do li prenis la kudrilon sammaniere kaj jen akcidento...

La nikso pikvundis sian fingron. Ho, granda doloro, ke li eĉ malbonfartis. La najadoj venintaj viziti la nikson konsilis al li, unue redoni la jaketon eĉ kun la kudrilo tien, kie li estis ĝin forpreninta, poste la doloro estos mildiĝinta.

Ĉifoje la nikso obeis la najadojn. Li forportis la jakon en la tendaron de la knaboj kaj revenis hejmen.

La najadoj pravis. La fingro doloris jam multe malpli. Hejme estis jam bandaĝo pretigita far la najadoj el nimfeaj floroj, per kiu li bandaĝis sian fingreton. Kaj ĝi perfekte ĉesis dolori.

Kaj la nikso neniam plu sopiris posedi tian jaketon, kian la homoj portas. Li estas kontenta pri la sia kaj fartas pli bone, se li ne suferas pro niaj zorgoj.

Rakontis Jitka Zvěřinová,  
esperantigis Josef Chvosta





## INTERREDAKTORE

el retroŝto de Internet ni ricevis multajn informojn pri nia movado; la plej gravajn ni prezentas en konciza formo al la legantoj:



■ Dum Kultura Semajnfino pri eldonado 29.05-01.06.1998 Flandra Esperanto-Ligo (Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen) provos venigi kiom eble plej multe da aŭtoroj por rakonti al la publiko pri siaj problemoj, sed ankaŭ por konfronti ilin kun la ideoj de eldonistoj kaj diskuti pri problemoj de elekto de manuskriptoj, rajtoj de la eldonistoj por adapti tekstojn, rajtoj pri reeldonado, eldonkvantoj, diskonigo de la eldonaĵoj, la merkato....

■ La slogano de GEA 2000 estas „Ideo trovas merkaton”. GEA deklaris la jaron 1998 la jaro de informlaboro, apartigis gazeton Esperanto aktuell al german- kaj Esperantlingva eldono. Sekve GEA pluiras la vojon al serioza kaj kompetenta prezento de Esperanto, unuflanke per klerigo de siaj membroj kaj duaflanke per elektitaj homoj, kiuj gvidas la laboron en la diversaj kampoj kaj tenas la gravajn kontaktojn. Tre grava paŝo tiurilate estis la instalo de pagata afergvidanto de GEA, kiu garantias la direktan kaj konstantan laboron kun la ekstero.

■ Nova hotelo “Esperanto” ekfunkciis en la ĉefurbo de la provinco Sansi, en norda Ĉinio. La hotelo estas investita de konata ĉina esperantisto Wang Qinglon. Li postulas, ke la dungitoj lernu Esperanton.

■ Post plurmonata persvada kampanjo finfine akceptiĝis ĉe la Universitato de Salford propono pri oficiala Esperanto-kurso. Ekde septembro 1997 proponiĝas

Esperanto kiel elektebla fako por studentoj pri fremdaj lingvoj en la unua studjaro ĉe la universitato.

■ Rondoplacon Doktoro Zamenhof (Rond-Point) en Laon, Francio, oni solene inaŭguris la 11-an de januaro 1998.

■ La 90-jariĝa jubileo de UEA

■ Ekde la 2-a ĝis la 7-a de marto 1998, okazos en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Valencia (Hispanio) Baza Kurso de Esperanto.

■ Dum la Hispana Civila Milito malaperis la tuta biblioteko de la valencia esperantista movado. Antaŭ nelonge la direktorino de la Urba Publika Biblioteko de Valencia, informis la lokajn esperantistojn, ke tiuj libroj ne perdiĝis, kaj ke ili, dum multjara kaŝiĝo en kelo, aperis. Temas pri vera trezoro. Pli ol 850 titoloj, de antaŭ la jaro 1936, la plej multo el ili en ege bona stato, nun baldaŭ estos je la dispono de la legantoj de tiu Biblioteko. Multaj el tiuj verkoj certe estas unikajoj nuntempe.

■ 32a ILEI-KONFERENCO, 8a-14a aŭgusto 1998 Montpellier - Francio, Temo: Lingvoinstruado, ponto al la mondo. Tradicia ĉiujara aranĝo de la Ligo okazos tuj post la UK en Montpellier. Post unujara paŭzo paralele okazos la ILEI-Gimnazio. Al tiu tutsermajna kunrestado estas bonvenaj E-istaj junuloj en la aĝo de 13-16 j kun bona kono de la lingvo. Programo estas tre varia: oni

havos studhorojn pri literaturo, historio, geografio, muziko... Krome, oni ekskursos, sportos.

■ Decembre de 1997 la teleteksto de sofia televido "Sedem dni" publikigis porkomencantan E-kurson el 12 lecionoj, preparitan de Mariana Evlogieva. La kurso okupis preskaŭ 150 teletekstajn paĝojn kaj vekis konsiderindan intereson. Venis petoj, ke la kurso aperu denove, en pli konvena tempo - ja dum la antaŭkristnaskaj tagoj oni ne tro lernemas. La teleteksto, kiu atingas pli ol 500.000 spektantojn, ankaŭ estonte pretas disponigi paĝojn por Esperanto.

■ Du hungaraj gimnazianinoj korespondus tutmonde:

17-jara knabino, Annamaria Klemencz, HU-8551 Nagygyimo't, Pa'pai u. 67.

18-jara knabino, Renata Rajki, HU-8598 Pa'pa-Tapolcafo", Dobre's u. 5.

■ Ĵurnalo Hamŝahri (Samurbano) - eldonkvanto 416000 - (la unua laŭ eldonkvanto en Irano) en sia 1435a numero - la 17an de decembro - favore dediĉis 1/6an de la lasta paĝo pri Esperanto klarigante pri la historio, aŭtoro kaj stato de Esperanto.

■ „Mister Sandman" inventis kaj dissendas la komputilviruson Esperanto. Laŭdire, tiu nova viruso infektas kaj Fenestro -maŝinojn kaj Makintoŝojn, kaj ĉiun 26an de julio aperigos interesajn komentojn anglalingvaj kaj Esperantlingvajn (!!!) sur la ekrano de la koncerna maŝino. Ĉu ni vere bezonis ĉi tion???

■ La redakcio de Eventoj alvokas aŭtorojn kaj tradukemulojn liveri popularsciencajn verkojn (maksimume 6 paĝojn) por publikigo - ni bezonas evoluigi nian nebeletran lingvajon.

■ Munkena Esperanto-Junularo iniciatas „Unuan Virtualan Esperanto-Renkontigon Tutretan (UVERT)" okazontan inter la 22a kaj la 29a de Marto 1998, samtempe kun la AIS-sesio en Moskvo, en komputila reto [www.esperanto.net/uvvert/](http://www.esperanto.net/uvvert/).

■ Sveda Esperanto-Federacio kongresos 15.17.5.1998 en Stokholmo.

■ La 17-an de januaro 1998 malfermiĝis Esperanto-centro en Bruselo danke al s-ro M. Goossens. En la teretaĝaj salonoj realiĝos kursoj kaj kulturaj vesperoj.

■ Polaj samideanoj preparas songazedon „Pola Stelo" por blinduloj, sed povos ĝin utiligi ankaŭ ceteraj esperantistoj dezirantaj aŭdi parolan E-vorton.

■ Okaze de la 54-a Internacia Junulara Kongreso okazonta en Rijeka (25.7.-1.8. 1998) Kroata Poŝto planas eldonon de telefonkarto dediĉe al la kongreso. La sama instanco honoris per la Esperanta po\*stmarko Unuan kongreson de kroataj esperantistoj en 1997.

■ Reelektaj en la Akademio. AdE estas renoviganta sian unuan trionon. Por 15 el la 45 postenoj, plus du vakaj el la dua triono (2001) kandidatas 28 personoj: Andre Albault, Antonio Alonso, Gerrit Berveling, Ignat Bociort, Werner Bormann, Jorge Camacho, Tomasz Chmielik, Renato Corsetti, Win De Smedt, Aldo de Giorgi, Reinhard Haupenthal, Christer Kiselman, Edwin de Kock, Ilona Koutny, Sergej Kuznecov, Jacques Le Puil, Jouko Lindstedt, Francois Lo Jacomo, Gerardo Mattos, Stefan Maul, Simo Milojević, Brian Moon, Mauro Nervi, Gončalo Neves, Andrzej Pettyn, Baldur Ragnarsson, Nicolino Rossi, Spomenka Štimec.

## Novajoj rilate la vojaĝon al UK

**Aligiloj:** peranto por la ĉijara UK estas KAVA-PECH (subskribita Petro Chrdle), per kiu vi povas pagi la aligkotizojn en ĉeĥaj kronoj. Mi esperas, ke ĉiuj, kiuj planas partopreni, jam pagis la aligkotizon, ĉar la plej favora limdato jam pasis. La dua limdato pasos fine de marto, do se iu ankoraŭ hezitas aŭ decidigis post la fino de 1997, pagu prefere en marto, ekde la 1-a aprilo estos la kotizo denove pli alta. Mi ne aperigas la prezojn en unuopaj kategorioj en ĉeĥaj kronoj, ĉar kiel vi certe scias, la kurso de ĉeĥa krono nun estas iom nestabila, do ni fiksos la kotizojn en ĉeĥaj kronoj nur laŭ la kurso valida komence de marto kaj sendos informon al ĉiuj, kiuj intertempe montris intereson per ajna maniero.

**Buskaravano:** Kiel jam vi povis legi en Starto, la Asocio de handikapitoj aranĝas specialan buskaravanan de Pardubice. Laŭ niaj informoj estas ankoraŭ lokoj en ĝi kaj interesatoj povas ricevi pli da informoj ĉe Jarmila Rýznarová, Na okrouhliku 953/21, 530 03 Pardubice, tel. 040/66 11 941



**Flugkaravano:** kiel antaŭanoncite, mi strebis ricevi favorajn flugbiletojn por povi organizi flugkaravanan de Prago al Montpelliere. Bedaŭrinde ĝis nun ni ne sukcesis ricevi pli favorajn flugbiletojn ol ĉirkaŭ 15000.- Kč/persono, pro kio ni (mi kaj Stanjo) rezignis pri flugo kaj uzos la regulan linion de Eurolines, trafikanta rekte de Prago al Montpelliere. Kiel peranto de flugoj nia vojaĝagentejo povas servi (espereble la prezoj de flugbiletoj iom falos, sed certe ne tro), tamen unue la interesatoj pri la flugoj atendu la duan bultenon de UEA, ĉar estas probable, ke UEA ricevos por la partoprenantoj de UK speciale favoran tarifon.

**Eurolines:** Mi traktis rekte kun kunordiganto de Eurolines, kiu tamen ne povis ankoraŭ fiksi la horaron nek la prezon por la venonta sezono (komencanta ekde aprilo), ĉar oni ne ankoraŭ fintraktis kun la francaj kolegoj. Antaŭvidita estas altigo de prezo proks. je 10%, la linio de Prago al Montpelliere certe restos. Ĉiuj, kiuj montris intereson kaj kiuj ankoraŭ ĝin montris, ricevos de ni pli precizajn informojn fine de februaro. Kiu volos kunveturi, ni volonte faros rezervadon, ke ni sidu komune kaj povu esperantumi jam dumvoje (kaj internacie, ĉar verŝajne kunveturos kelkaj niaj germanaj samideanoj loĝantaj proksime de ĉeĥa limo).

**Loĝado:** nek pri la loĝado mi nun povas informi pli precize. Ĉiuj senpacienuloj, kiuj urĝigas nin (sed ne nur ili), certe ricevos rekte la informojn, kiam mi ekhavos ilin. Intertempe venos certe ankaŭ la oferto de UEA en la dua bulteno, do bonvolu ne zorgi, ke vi restos sen konvena lito.

**Nombro de aliĝintoj el Ĉeĥio:** ĝis nun aliĝis pere de ni al la UK 46 ĉeĥaj partoprenantoj. La nombro de aliĝintoj tamen estas pli alta, ĉar tiuj, kiuj havas monon sur sia konto ĉe UEA verŝajne aliĝis rekte kaj ni ne devas nepre scii pri ili. Laŭ tio jam nun estas klare, ke la reprezentateco de ĉeĥa esperantistaro en Montpelliere estos relative alta.

# Premio Fonto-Iltis

El la revuo *Eventoj* (1997: n-ro 133, p. 1) antaŭ nelonge legeblis la apuda komunikilo:

*Oni prirabis la SAT-sidejon!*

En la nokto de la 5-a al la 6-a de septembro 1997 nekonataj personoj eniris perforte en unu el miaj lokaloj en la avenuo Gambetta. Ili perfortis pordon, eligis ĉiujn meblojn kaj arkivaĵojn (dokumentoj arkivigitaj de post la jaro 1921), kaj masonis la enirejon. Plendo kontraŭ nekonato estis farita ĉe la justicpolico. Por vidi la necesajn pluajn paŝojn necesas atendi la traktadon kun la asekuristoj.

*Kreŝimir Barkoviĉ*

Temas efektive pri nekredenda kaj senprecedenca evento en nia Movado. Kiu povis ŝteli la kompletan arkivon de SAT kaj, kvazaŭ moke, eĉ masoni la pordon?

Jen demando solvota kredeble ne nur de la pariza polico, sed tiktla por ĉiu detektivo aŭ verkisto de detektivaj. Tial, por solvi la problemon almenaŭ en la limoj de la fantazia probable, la eldonejoj **Fonto** en Brazilo kaj Edition Iltis en Germanujo decidis premion de 500,- NLG por la plej bona detektiva romano pri ĉi temo:

**Kiu ŝtelis la SAT-arkivon?**

Kondiĉoj: Rajtas parto-preni ĉiu verkemulo kun la escepto de oficistoj kaj estraranoj de SAT.



Lim-dato: La manuskripto devas atingi unu el la eldonejoj plej malfrue la 30an de junio 1998. Kopio estu sendita al la dua eldonejo.

Amplekso: La romano ampleksu minimume 100 presitajn paĝojn. La premio nuligos, se antaŭ la lim-dato la polico sukcesos klarigi la aferon. La decidon pri la plej bona konkursaĵo rezervas al si la du eldonistoj. La premiita verko aperos kiel komuna eldono de Fonto-Iltis.

Adresoj :

**FONTO**

Gersi Alfredo Bays  
Caixa Postal 49  
BR-89801-970 Chapeco (SC)  
Tel./fakso: + 55 497 221454

**Edition Iltis**

Irmí Hauptenthal  
Schulsh. 30  
D-66133 Scheidt  
Tel. + 49 681811653

# Konkursoj de TEJO

TEJO decidis lanĉi serion de konkursoj. La unua estos *Desegnado por Infanoj*. Ĝi dividiĝas en du partoj:

1. Por infanoj inter 0 kaj 15 jaroj. Ili devos sendi desegnojn kun la temo „Amikoj el la tuta mondo“. La infano devos provi esprimi per desegno, kion signifas por li/ŝi povi havi amikojn ĉie en la mondo. La gepatroj helpu kaj instigu ilin!

2. La dua estas nur por infanoj inter 11 kaj 15. La temo estu TEJO. Tio signifas la ecojn, kiuj TEJO-n ornamas, kiel ekzemple internacia agado, interkompreniĝo, samrajteco por ĉiuj... La gepatroj kaj/aŭ instruistoj devos helpi al infanoj kompreni tiajn konceptojn dialogante pri ili kaj pri la laboro de TEJO. La infanoj rajtos uzi mallongajn vortojn (kiel „Saluton“ aŭ „TEJO“). Ideala estos la serĉado de simbolo, kiu reprezentos, kion TEJO signifas (iaspeca logotipo).

La infanoj ne bezonas esti esperantistoj aŭ paroli la lingvon. Tiel, ke ĉiu instruisto, kiu deziras disvastigi la informojn en sia lernejo, povas tion fari (kaj ni kore instigas ilin) kaj ĝenerale ĉiu, kiu konas aŭ havas infanojn, povas proponi al ili la partoprenon.

La desegnoj povas esti faritaj per iu ajn materialo. Ne estu pli grandaj ol folio formato DIN A3, aŭ ili estu DIN A4.

Estos multaj premioj sub la formo de ludiloj, komiksoj ktp.

La unua premio valoros maksimume 300 DM, la dua maks. 150 kaj la tria maksimume 50 DM. Krome estos pluraj

konsolo-premioj, ekz. ekzemplero de Asteriks en Esperanto.

La limdato por ambaŭ estos la 30-a de aprilo de 1998.

Partoprenu!

Metu la desegnon en koverton kaj fermu ĝin. Poste metu tiun koverton en alian kune kun papero kun via nomo, adreso, aĝo kaj ĉio, kion vi konsideras grava pri vi. Indiku sur la koverto „Por la desegno-konkurso“ kaj sendu al la

Centra Oficejo  
Nieuwe Binneweg 176  
NL 3015 BJ Rotterdam



# Internacia duobla konferenco

omaĝe al Eugen Wüster en Vieno:

24. -26. 8.1998

„ProCom '98” kun Esperantlingva parto.

Okaze de la 100-jariĝo de Eugen Wüster (nask. 3.10.1898), fondinto de la terminologio-scienco kaj kunfondinto de la esperantologio, en Vieno okazos du inter si ligitaj konferencoj:

1. Scienca konferenco: „Profesia komunikado, terminologio kaj planlingvoj”
2. Kvara Infoterm-simpozio: „Terminologia laboro kaj sciotransigo”

Ambaŭ konferencojn kune organizas Internacia Instituto pri Terminologisciencia Esploro (IITF), Internacia Informcentro pri Terminologio (Infoterm), Internacia Esperanto-Muzeo Wien (IEMW) kaj la Aŭstria UNESKO-Komisiono.

Al oficialaj subtenantoj de la konferenco i.a. apartenas UEA kaj la germana Societo pri Interlingvistiko (GIL).

La oficialaj konferenclingvoj estas la angla, franca, germana kaj Esperanto.

Al la konferencoprogramo apartenas komuna malfermo por ambaŭ konferencoj, kun prelegoj pri la vivo, verko kaj scienca signifo de Eugen Wüster, i.a. kun kontribuo de Detlev Blanke („Terminologio kaj planlingvoj”).

La 1-a konferenco krome enhavos la sekcion „Terminologioscienco kaj planlingvoj” (gvidata de Blanke). La konferenca oferto inkludas specialan ekspozicion de la Internacia Esperanto-Muzeo. Herbert Mayer apartenas al la organiza kaj Detlev Blanke al la programa komitatoj.

Interlingvistoj kaj esperantologoj partoprenu la duoblan konferencen, resp. almenaŭ la priplanlingvan sekcion! Ĝi traktos la rilatojn de Wüster al planlingvoj, lian signifon kiel esperantologo en pasinteco kaj nuntempo, la rilatojn inter planlingvoj kaj terminologioscienco, terminologiajn aktivecojn en Esperanto k.s. La prelegoj estos publikigitaj de TermNet en aparta volumo.

Interesuloj pro organizaj demandoj (pluaj informoj, aliĝilo, tranoktoj, invituloj ktp.) sin direktu (en la germana aŭ la angla) al la loka organizanto: TermNet, Summeringer Hauptstr. 24, A-1110 Vieno, Tel. +43-1-74040 280 / Fakso +43-1-74040 281, reto: termnet@termnet.at

Pro prelegoj kaj ĉi-koncernaj informoj kontaktu Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel. +49-30-54 12 633, fakso +49-30-54 56 742.

## Interlingvistikaj studoj

Universitato Adam Mickiewicz en Poznan (UAM, la dua plej granda universitato en Pollando) anoncas 3-jaran esteran studadon pri interlingvistiko. La unua studjaro startos en la vintra semestro 1998/1999 kaj poste ĉiun trian jaron. Gvidas d-ino Ilona Koutny kaj prof. Tadeusz Zgółka, prelegas M. Duc Goninaz, H. Tonkin, T. Tyblewski, J. Wells, V. Barandovská-Frank, K. Schmideliusz, I. Ertl.

Partopreni povas abiturientoj de mezgradaj lernejoj kun bona scio de e-o. Prezo 400 USD, por ni 250 PLZ.

# Statistiko de gazet-artikoloj en 1997

Gazetartikoloj pri Esperanto + intervjuoj	80
Lecionoj de Esperanto en gazetaro	21
Tradukoj el Esperanta gazetaro	8
Mencioj pri Esperanto en gazetaro	5
Anoncoj pri kursoj aŭ aĉeteblaj lerniloj	85
<hr/>	
Sume	199

Ni ne povas esti kontentaj pri la rezulto. Mi opinias, ke multaj artikoloj aperis kaj aŭtoro simple forgesis sendi al mi kopion. Rezulto 199 estas dokumentita en arkivo de la komisiono pro presoj kaj informoj. Artikoloj el gazetaro estis plejparte transdonitaj al mi proprane dum diversaj renkontiĝoj. Eble post plialtigo de poŝtpago multaj hezitis oferi monon por fari de artikolo kopion kaj sendi ĝin al mia arkivo. Mi proponas organizi dum jaro 1998 konkurson por unuopuloj, kiuj sukcesos publikigi plej multe da artikoloj en gazetaro. Ni povas prepari 10 allogajn premiojn, kiuj kaŭzos pli grandan aktivecon en skribado. Nun, kiam publiko plej ofte interesiĝas pri angla kaj germana lingvoj, ni devas skribi pri avantaĝoj de Esperanto kiel eble plej ofte. Klarigi ĝian facilecon, internaciecon, universalecon kaj demokratecon. Skribi pri ebleco de laborbrigadoj, pasporta servo, kiu disponigas senpagajn loĝejojn, someraj kursoj dum libertempo, propedeŭtika efiko de Esperanto dum studado de pluaj naciaj lingvoj, universalaj kongresoj kaj jarlibro. Tiuj por ni konataj faktoj estas por vasta publiko tute nekonataj. Multaj homoj tute ne kredas, ke eblas per internacia lingvo interkompreniĝi kun fremdulo.

Se mi volus jam nunjare vicigi kontribuantojn, kiuj estis plej ofte aŭtoroj de gazetartikoloj, la vico aspektus jene:

S-ano Jar. Liška sukcesis gajni en „Prostějovský večerník“ daŭran rubrikon, kie post vico da propagandaj artikoloj nun aperadas esperanta kurso por komencantoj.

Daŭran lokon en „Vyškovský zpravodaj“ gajnis Ing. Josef Vojáček. Krome, liaj artikoloj aperadas en „Rovnost“ en Brno kaj „Svoboda“ en Ostrava.

Jarka Rýznarová publikadas ĉefe en presoj en Pardubice, Jindra Dahotová en „Boleslavský deník“, Zdenka Novotná en „Českobudějovický zpravodaj“ kaj „Orlické noviny“.

JUDr. Vladimír Mohapl, Ludvík Chytil, Dr. Petr Chrdle, Jindřich Tomášek, Marie Bartovská, Vlado Sládeček, J. Polách, Ing. Josef Kříž, Mir. Jira kaj pluaj aliaj sukcesis kelkfoje publikigi ion pri E-movado. Sed ni volus, ke en jaro 1998 ĉiuj kluboj en tuta respubliko ataku redakciojn per artikoloj, ke ilia nombro kresku.

Preso estas potenca, dependas nur de nia aktiveco, ĉu ni eluzos plene nian eblecon. Mi instigas ĵurnalistojn-esperantistojn, ke ili helpu en laboro de KTI.

Drabomír Kočvara

**Kontribuo de ĈEA al Kampanjo 2000:  
Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko  
(Historio kaj perspektivoj)**

per ĉi tiu artikolo mi volas rememorigi la historion de la seminarioj Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, kiujn aranĝis alterne Ĉeĥa kaj Slovaka Esperanto-Asocioj kaj kiuj famiĝis inter fakuloj sub mallongigo AEST (foje ankaŭ SAEST). Oni tradicie diskutadis gravajn fakajn kaj teknikajn temojn kun atentigo al terminologiaj problemoj.

Jen la historia trarigardo de la konferencoj:

1978 (Žilina, Slovakio): Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (la temo restis kiel komuna nomo de ĉiuj sekvantaj konferencoj, kiuj tamen jam ricevis apartajn temojn traktatajn)

1980 (Ústí nad Labem, Ĉeĥio). Temoj: La vivomedio

1981 (Žilina, Slovakio). Temoj: Komputiloj

1982 (České Budějovice, Ĉeĥio). Temoj: Energio - la tutmonda problemoj

1983 (Žilina, Slovakio). Temoj: Komputado

1984 (Brno, Ĉeĥio). Temoj: Nutraj problemoj

1988 (Poprad, Slovakio). Temoj: Raciigo en Scienco kaj Tekniko

1989 (Strážnice, Ĉeĥio). Temoj: Transporto

De ĉiuj seminarioj ekzistas valoraj prelegkolektoj (parte ankoraŭ aĉeteblaj

en la libroservo de ĈEA), kiuj klare respeguligas altan nivelon de la traktadoj.

Ĉeĥa Esperanto-Asocio dum siaj komitatkunsidoj konstatis, ke nepre valoras ne nur rememori la priskribitan fakan kaj terminologian agadon, sed indas daŭrigi ĝin, kvankam eble en novaj dimensioj.

Oni jam faris tiurilate jenajn decidojn:

## de SAEST al KAEST

1. Ĉar la termino „seminario“ ne estas tro taŭga por similaj kunvenoj de samfakuloj, ni nomu en la estonteco la aranĝojn „kolokvo“, tamen restu la titolo „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“

2. Ĝin ni okazigu denove ĉiun duan jaron (paran) en Ĉeĥio kaj proponu al fakuloj eksterlande transpreni ĝian organizon en la neparaj jaroj. La unua, kiun ni jam tiucele kontaktis, estas klare la nove fondita SKEF, la tutŝtata Esperanto-organizaĵo en Slovakio.

3. La unuan kolokvon Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (mallonge KAEST) ni aranĝos en Prago en la tagoj 1998-11-13/15. La sekcio A traktos la temon „Modernaj rimedoj de komunikado: avantaĝoj kaj problemoj“ dum la sekcio B pli larĝan temon „Terminologiaj problemoj rilate aplikon

Ambaŭ temoj estas en stadio de proponoj kaj ni volonte akceptos proponojn de precizigo aŭ ŝanĝo.

4. La kolokvon organizos ĈEA en kunlaboro kun profesia Kongresa kaj kleriga entrepreno KAVA-PECH kaj proponos transprenon de aŭspicioj flanke de UEA kaj/aŭ ISAE.

5. KAEST estu nia kontribuo al Kampanjo 2000, tial ankaŭ la prelegkolekto estu bonkvalite eldonita, kun nacilingvaj resumoj, ke ĝi povu servi ankaŭ propagandcele inter ne-esperantistoj.

Ĉiuj interesatoj pri la partopreno bonvolu antaŭaliĝi (ne ankoraŭ sindevige) al la adreso de Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice fakso: 02.9912126, rete: chrdle@kava-pech.cz, kien vi ankaŭ sendu proponojn de viaj kontribuoj. Ĉiuj, kiuj per ajna formo montros sian intereson ricevos rekte pli detalajn informojn kaj aliĝilojn.

Petro Chrdle  
vicprezidanto  
de Ĉeĥa Esperanto-Asocio



## NOVAJ LIBROJ

Karel Kraft: **Ĉeĥa-esperanta vortaro**,  
KAVA-PECH 1998, 512 p., 188 Kč

Karel Hynek Mácha: **Majo**  
ĈEA 1997, tr. Tomáš Pumpr, ilustris  
Zdeněk Beneš, postparoloj Jiří Kořínek,  
Josef Rumler, 56 p.



Bruno Vogelmann: **Nova realismo**  
KAVA-PECH 1998, 3-a eldono, 192 p.  
Luksa eldono de la fama verko kun bela  
koverto de Luděk Neužil.

Konsultiĝo de la aŭtoro de la nova  
vortaro Karel Kraft kun kunlaborantoj  
en Dobřichovice



ESPERANTO  
ul. Esperantistů č. 3  
674 01 Třebíč

AGROBANKA TŘEBÍČ  
č.ú. 492900-514-0600

LANČOV

ESPERANTO - ANGLIČTINA - NĚMČINA - FRANCOUZŠTINA

Tyto kurzy pořádá ve svém zařízení v Lančovské zátocce na Vranovské přehradě Klub esperanta a jiných světových jazyků Theodora Kiliana v Třebíči.

1. běh: 5.7. - 18.7. 1998 - E, A, N  
2. běh: 19.7. - 1.8. 1998 - E, A, N, F, kurz mineralogie  
3. běh: 2.8. - 15.8. 1998 - E, A, N  
rekreace před 1. během: 27.6. - 3.7. 1998  
rekreace po 3. běhu: 16.8. - 22.8. 1998

Ceny pobytu, stravy a výuky činí:

- pro děti do 15 let 2650 Kč, kurz esperanta pro členy svazu 2200 Kč  
účastníci nad 15 let 2850 Kč, kurz esperanta pro členy svazu 2300 Kč  
pro děti bez jazyků 2500 Kč

Vyučuje se v dopoledních hodinách, každý den 4 hodiny. Odpoledne koupání, projíždky na lodičkách, vycházky, hry, soutěže, karneval. Navštívíme zámek ve Vranově nad Dyjí, hrad Bitov, zříceninu hradu Cornštejna, přehradní hráz. Podle zájmu bude i celodenní výlet do Viáně a nebo vycházka do rakouského města Hardegg. **Nezapomeňte pas!**

Členové Českého esperantského svazu mají letos v Letním esperantském táboře výraznou slevu pro kurz esperanta, děti o 450 Kč, dospělí o 550 Kč. Jen silně zastoupené esperantské kurzy mohou na neesperantské táborníky zapůsobit dojmem příznivým pro mezinárodní jazyk. Upozorňujeme je na propedeutickou hodnotu esperanta, tedy na schopnost esperanta usnadňovat následnou výuku dalších jazyků. Pohlédte na obrázek Pavla Raka:



☆ Starto 1/1998 ☆

Odesílatel:

Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069  
111 21 Praha 1  
Internet: cea @ tnet. cz  
☆ STARTO ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (29. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno  
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (29-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 16 gld

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,

Ĉeĥio

Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno

Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,

č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X

**NOVINOVÁ ZÁSILKA**

Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1